*Freneza Revuo Esperantista Ŝatanta Observi*

N-ro 11(54)


# FREŜO

La oktobro 2017j

*La retrevuo estos senpaga nur por ĉiuj kiuj volas ricevi ĝin*

Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin :-)

Pazdziernik 2017 r.



Se vi volus elŝuti antaŭajn numerojn de "FREŜO"
jen la ligilo al la magazeno de e-magazinoj:
(enskribu ĝin en retumilo - **NE KOPIU!**):

**https://goo.gl/xh1U1D**

-------------------------

*Se vi havus proponojn, materialojn por la venonta numero de ĉi revueto - skribu al mi:*

**fresxo@protonmail.com**
Skajpo: **marianzdankowski**

**Kunlaborantoj:**

*Eduardo KOZYRA*
*Franciszek WITUCKI*
*Mirka KUBICKA*
*Henryk WOWER*

*Se vi volus, ke ĉi-tiun belegan revueton ricevadu viaj geamikoj - sendu al mi iliajn ret-adresojn:*

**fresxo@gmail.com**
**fresxo@protonmail.com**


*Ĉefredaktoro:*
**Marian ZDANKOWSKI**
*poŝtel. +48 622 115 650; +48 (0) 604-079-141*

*Adreso: str. Limanowskiego 36 m 3,*
*10-343 OLSZTYN, POLLANDO*
*retadreso:* fresxo@protonmail.com
*Skajpo:* **marianzdankowski**


*Se vi volus instigi min ne nur pervorte (perforte):*

Bankokonto:
(IBAN) n-ro: PL 54114020040000380246602778
Ricevonto: Marian ZDANKOWSKI
Ricevontadreso:10-343 Olsztyn; Limanowskiego 36/3
BIC/SWIFT: BREXPLPWMBK
Bankadreso: BRE Bank S.A. INTERNET BANKING,
al. Pilsudskiego 3, 90-368 Lódz
SORT CODE: 11402004
Konto ĉe UEA: mzda-e

**Grave:**
*mi povas gvidi miajn kvizo(j)n dum via E-arango !*
*Vi kontaktiĝu min rilate al ĉi afero !*













# *Jen diras la Ĉefredaktoro*


*Frivola Revuo Efemera kun Ŝokantaj Obscenaĵoj* **N-ro 11(54)**

**FREŜO**

**La oktobro 2017j** La retrevuo estos senpaga kiel tipaj retrevuoj — Aperos ĉiumonate, se sufiĉos por mi firman volon prepari ĝin **Pazdziernik 2017**




*Gramatikon mi ne konas kaj gazetojn ne abonas...*
*"ESTAS MI ESPERANTISTO" - Julio Baghy*

## La ĉefredaktoro skribas:

En la nuna numero de **FREŜO** estas kiel kutime kelkaj interesaj tekstoj...

- en la "**Postaĵa Vivo"** **vi tralegos kiumaniere nunaj raket-dimensioj dependas de antikvaj postaĵoj de ĉevaloj**

- kutima novelo de Barry Friedman sub titolo **BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ**

- en "Virtuala Vivo" - informoj kiuj ne konas kristanoj (kaj ili eĉ ne volas koni)

- **Malgranda konsult-libro - por virinoj** (man-libreto) **- "kiumaniere oni devas agi kun viro"**

**- en "Politika Vivo" - pri problemoj kun „rifuĝintoj"**

Krom tio - kiel kutime: ŝercoj, anekdotoj, enigmoj ktp...

Malpermeso por E-sanktuloj vivantaj

Via Ĉefredaktoro



# Reagoj de Legantoj

Saluton Marian!

Estas cxiam granda gxojo ricevi vian vivigan revuon. Krom la seriozaj tekstoj, la artajxoj kaj spritajxoj estas vere allogaj. Mi havas nur etan plendeton...la verda fono estas tre malbona por la okuloj cxefe cxar ni legas gxin surekrane...nur tio...
Mi sxategas la revuon kaj disdonas gxin al geamikoj kiuj ne havas aliron al interreto...
Antauxen!
Amike kaj legeme,

**BAZILIO Joe Costa - Brazilio**

Saluton kara Marian
Mi ricevas regule viajn informojn pri Freso
Kun plezure mi legadas
Daurigu Kuragho
Amike anchjo de Tuluzo Francio

**MIRC Andre  Francio**

Dankon, mi ricevis gxin en ordo.
Via bulteno estas tre amuza kaj signifo plena.
Karajn salutojn

**Vito Tornillo Italio**
IFEF sekretario.

saluton kara marian:
koran dankon pro via sendado de 'fres'o' (9/52).
mi bedawras ke novajxo de e-giganto sino boulton.
temp pasas tre rapide, mi pregxas sxian eternan felicxon.
kore,

**etsuo**

Kara amiko Marian,

mi dankas por la daùriga ricevado de via revuo, kiun mi multe shatas precipe pri la intresaj enhavoj kaj artikoloj; dum la monata programo de nia E-Grupo "A. Tellini 1912" , pri informado "El la esperanto gazetaeo ", mi ofte prezentas ilin el niaj geklubanoj. Koran dankon kaj gratulojn.
Samideaa kaj amike ,

**Mario Amadei, sekretario de BEG**

Jes! Mi tre deziras dauhre ricevi vian retrevuon, kiu ege plachas al mi!
Kore, amike, frate, samideane,
brakume kaj admire salutas,

**Affonso Soares**
SOARES Affonso Borges Gallego - BRAZILO





# Anekdotoj de IJK

**Du puloj interparolas:**
- Kion vi farus, se vi gajnus en loterio?
- Mi pensas, ke mi aĉetus tre grandan hundon!

**Junaj geedzoj interparolas dum la nuptonokto:**
- Karulo mia, kio estu ĝia nomo?
- Se ĝi eskapas de ĉi tie - **diras la edzo** - ĵetante la kondomon tra la fenestro - tiam David Copperfield.

 **- Nun komencig'as la danco!**
Diris la papago, kaj enflugis la ventumilon.

**- Lakeo, ĉu en la teo troveblas kolbaso?**
- Mi pensas, ke ne, sinjoro.
- Tiukaze mi denove eltrinkis la noktan pisujon.

**En la stacidomo ekkrias laŭtparolilo**:
- Atenton, atenton, la trajno el Budapeŝto tardas 95 minutojn.
Iu el la amaso:
- Oh ve, preskaŭ unu horon!

**- Kion diris via patro, kiam oni enprizonigis vin?**
- Saluton, filo mia...

**- Johaneto, kion vi preferus, fraton aŭ fratineton?**
- Egalas Paĉjo. Faru kion vi volas.

**Du edzinoj interparolas:**
- Imagu Anna, mia edzo farig'is 400 procente impotenta!
- Kiel tio eblas?
- Ĝis nun li estis centprocenta, sed lastdimanĉe li falis de la eskalo, rompis la du brakojn, kaj mordis la langon.


**- Doktoro, mi havas grandegan problemon.**
C'iumatene je la sepa mi fekas!
- Bonege, tio estas sana afero.
- Sed mi vekiĝas je la oka!


**Du pas'tistoj staras sur la montopinto.**
Pasas unu jaro, du jaroj. Je la tria jaro allogega virino aperas en la valo, kaj komencas nude sunbani sin.
La du paŝtistoj hastegas al la valo, kaj ĵetas sin al la virino. Tiu ekparolas:
- Bone, bone, sed unue vi uzu tiujn ĉi kondomojn, ĉar mi ne ŝatus havi infanojn de vi.
La du paŝtistoj fikas bone, kaj reiras al la montopinto.
Pasas unu jaro, du jaroj. Je la tria jaro ekparolas la unua paŝtisto:
- Johano, ĉu vin embarasus, se tiu virino havus de ni infanon?
- Tute ne.
- Tiukaze ni demetu jam tiun ĉi kondomon de nia kaco.




# VERA VIVO












# P O S T A Ĵ A   V I V O

La amerika standarto pri larĝo de fervojaj trakoj (t.e. : la relaj interspacoj) egalas al 4 futoj kaj 8,5 coloj. Ĉu vere ĝi estas bizara/hazarda nombro? Kaj ĉu vi scias kial ĝuste tian standardon oni aplikas?

Ĉar laŭ tiu maniero oni konstruas la fervojajn trakojn en Anglio, kaj ĝuste la anglaj alvenintoj konsruadis la amerikajn fervojajn trakojn. Sed kial tamen la angloj konstruadis tiujn ĝuste tiamaniere?

Ĉar la unuajn fervojajn trakoj konstruadis la samaj homoj, kiuj pli frue konstruadis tramliniojn, kaj ĝuste tie pli frue oni utiligadis tian standardon. Tamen kial oni utiligadis tie tiun standardon?

Ĉar la homoj, kiuj konstruadis la tramliniojn, utiligadis la samajn ŝablonojn kaj ilojn, kiujn ili utiligadis ĉe konstruado de tramoj, kiuj havis tian radodistancon.

Ĉio en ordo! Sed kial la tramoj havis ĝuste tian bizaran (strangan) radodistancon?

Nu, kaj kio, se ili provus utiligi ian alian radodistancon, tiam ili rompus certan malnovan principon konstruadi la anglajn longdistancajn vojojn, ĉar tiuj ĝuste havas tiajn radsulkajn distancojn. Kiu do konstruadis tiujn stardantajn vojojn kun radsulkoj?

La unuajn longdistancajn vojojn en Eŭropo (ankaŭ en Anglio) konstruadis la Roma Imperio por siaj legioj. La vojoj estas uzataj ĝis hodiaŭ. Sed kial tiuj radsulkoj?

Primare la radkavojn formis la romaj duradaj batalĉaroj; do ĉiu alia utiliganto de tiuj vojoj devis alkonformiĝi al tiuj kondiĉoj, ĉar alie oni povus difekti la radojn de siaj veturiloj. Ĉar la duradaj batalĉaroj estis konstruataj de la Roma Imperio, do ili ĉiuj estis similaj unu al la alia, se temas pri la radodistancoj. Do kiel videblas la amerika standardo pri la larĝo de fervojaj trakoj: 4 futoj kaj 8,5 coloj devenas de la teknikaj parametroj de romaj duradaj batalĉaroj.

Kaj burokratismo estas eterna.

Do la sekvan fojon, kiam vi ricevos iun teknikan dokumentaron kaj vi suspektos, ke ĝi havas ion komunan kun la ĉevala anuso, vi tute pravos, ĉar la romaj batalĉaroj estis tiele konstruitaj por ke ilia larĝo estu alkonformigita sume al postaĵoj de du batalĉevaloj.

Kaj nun malgranda evoluigo de la temo…

Kiam vi rigardas kosman pendolveturilon sur startpozicio, vi vidas du grandajn startraketojn fiksitajn ĉe la flankoj de ĉefa brulmateriala ujo. La raketoj estas movigataj per solida brulmaterialo, koncize SRB, produktita de la firmao Thiokol, en Utah, en Usono. La inĝenieroj, kiuj projektis SRB, preferus, ke la raketoj estus pli dikaj, sed… SRB oni transportas el la produktejo al la startpozicio fervoje. Sed tiel okazis, ke la fervoja trako certan distancon kuras tra tunelo traborita en monto. Do la raketoj devas trovi lokon en la tunelo. La tunelo estas nur iomete pli larĝa ol la fervoja trako, kaj tiu lasta, kiel vi jam scias, havas la larĝon de du ĉevalaj postaĵoj. Tiele do unu el ĉefaj konstrukciaj apartaĵoj de la kosma pendolveturilo, eble eĉ de la plej moderna transporta sistemo en la mondo, estis ekde pli ol du mil jaroj determinita de la larĝo de ĉevala anuso.

hw



# SENVORTA VIVO

















**La civitanoj de** Kartvelio ricevis rajton eniri Eŭropan Union sen vizojn. Loĝantoj de respublikoj: Suda Osetio kaj Abĥazio povos profiti tiun privilegion, kondiĉe ke ili havos la kartvelian pasporton.


**La fama teroristo** Ilich Ramirez Sanchez konata sub pseŭdonomo „Ŝakalo” ricevis laŭvican, la trian verdikton, kondamnata lin al ĝismorta malliberigo. Tio estis puno pro sanga atenco en Parizo en 1974, kaŭzanta morton de du personoj kaj vundanta 34. „Ŝakalo” opinias sin senkulpa.

**La aŭstra ministro** pri eksterlandaj aferoj nomis la malpermeson, enkondukita en la lando, vesti burĥojn kaj ĝenerale vestojn kaŝantajn vizaĝojn en la publikaj lokoj, leciono pri „estimo de demokratia socio”. Planata estas ankaŭ malpermeso de disdonado de Korano kaj specialaj kursoj pri aŭstraj valoroj.

**Farado de memfoto** (selfie?) mortigas en la mondo pli da homoj ol balenoj. Spertis tion du meksikaninoj, kiuj faris por si foton sur la plato de flughaveno. Post momento mortigis ilin alteriĝanta aviadilo.

**Kia estas** probableco, ke ies vivo finiĝos en la stomako de granda serpento? Ŝajnis, ke nula. Tamen tion spertis iu juna indoneziano, kiu perdiĝis dum la vojo al laborejo. Serĉantaj lin policistoj renkontis strange dikan sepmetran pitonon. Bedaŭrinde plej malbona suspekto evidentiĝis vera.

Se disŝutiĝis salo – **ekestos kverelo.**
Se disŝutiĝis sukero – **aŭguro de repacigo.**
Se disŝutiĝis kokaino- **estos vizioj.**
Terenfalis forko – **venos iu malsata.**
Falis sapo – **atendu ion neatendintan.**
Nigra kato – **malfeliĉo.**
Rozkolora kato – **tro da alkoholo.**
Blua (ĉu kato?) – **estos elspezoj.**
Se hirundoj flugas malalte – **pluvos.**
Se malalte flugas bovinoj – **disŝutiĝis kokaino.**
Se krevis spegulo – **aŭguro de malfeliĉo.**
Se fendiĝis pantalontranĉo – **estos honto. Pli aŭ malpli granda …**
Se krevis kondomo – **estus pli bone se krevus spegulo.**
s nazo – okazos senbrida drinkado.



el pli frua numero

# NOVELA VIVO

## BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ


de Barry Friedman

**Nun estas jaro 2015** kaj la mondo estas en katastrofo. Glito estas mezaĝa kaj suferas je grandega krizo kaj hejme kaj profesie. Obamo estas prezidanto kun la sansistemo Obamakaro en plena efiko, eŭropaj nacioj estas sur la rando de kolapso, Grekio kaj Portugalio kaj Irlando estas preskaŭ bankrotaj kaj suferas de amasa senlaboreco, la recesio de 2008 ankoraŭ havas kontinuajn efektojn je la generacio kiu venis el la ĥaoso de la Buŝ-a administrado, la abomenaj militoj en Irako kaj Afganio malplenigas la ekonomion pro troa elspezado je militaj penadoj premplatigi la malbonajn mez-orientajn teroristojn kaj trovi tiujn ĉiam-elusivan amasdetruilojn. Ĉinio estas la kreskanta monda superpotenco. Usono estas sur la deklivo. Ĝia urboj havas naŭzajn dekadencojn kaj amasoj da senesperaj krimo, vandaleco, malordo, kaj rubo, kaj urino svarmas ĉie. En la lando la kondiĉoj estas malagrablaj de Nov-Anglio al la Sudokcidento kaj al la marĉoj de Louisiana kaj al la putriĝa Miamio. Kanado ŝajnas esti ideala loko por junaj usonanoj forkuri dum tiu tempo de kadukiĝo kaj malĝojo.


**Glito spertas traŭmaton**; ĉio, tion li antaŭe kredis kiel infano, ŝajnas iom sencela: la serĉo por mono, belaj virinoj, rapidaj aŭtoj, senhonta, ekstravaganca vojaĝado. Kiam li estis juna viro li estis sovaĝa kaj malretenita. Li ofte iris je neplanitaj veturoj al la Sudo kaj tra Teksaso kaj en Meksikurbo kaj Acapulco, je subitaj flugoj al greka insulo kaj vojaĝoj en Nov-Jorko por vespermanĝi ĉe la restoracio de Sardio kun Brodŭaj-aj produktantoj. Li iradis al senvestiĝejoj ĉe Henderson Vojo kaj en Rejnoldsburgo ekstere de Brajs kaj Livingston Vojo, kie li sendube povis akiri la veran guston de la ohia laborist-klasa idioteco. Li amis tian vivon de nescio; li amis, ke li ne devas legi romanojn, ne devas studi fremdajn kulturojn, ne devas spekti CNN-on aŭ Foks-novaĵojn. Li ignoris Raĥelon Madoŭon kaj Lupon Bliceron kaj Andersonon Cuperon. Tiuj homoj estis idiotoj.

**Sed en mezaĝo ĉio ŝanĝas**. Sintenoj ŝanĝas kaj la scio de morteco igas ke oni volas esplori pluajn eblojn, malsamajn vivmanierojn, kaj novajn perspektivojn pri tiel, kiel oni devus vivi. Glito komencis studi aliajn kulturojn, li ekstudis hispanan gitaron, filipinan kuirarton, kamboĝajn lingvajn lecionojn, flandran dancadon, kaj finnan kaligrafion. Unu de la malmultaj amikoj de Glito kiu restis en Kolumbuso estis maljunulo nomata Rudiakaniso kiu vivis en la Klintonvila kvartalo for de Haj Strato proksime al la Grajslanda Plazo. Klintonvilo estis ĵazema kaj duon- unika speco de loko tie, kie blankulaj geneedukitoj miksigis sin kun la artaj elegantaj homoj kiuj vivis tie je bizara miksaĵo. Estas japanaj enmigrintoj kiuj starigis siajn bifstekojn restoraciojn apud eminentaj ohi-ŝtataj instruistoj pri jida, aŝkenazi-juda, kaj germana historia studoj.


al la paĝo 23




# FEJSBUKA VIVO













# VIRTUALA VIVO



**La jaro 1208**
La papo Innocento III oferis al ĉiu, kiu kaptos armilon en manon, krom prokrasto de pago kaj la Dia savo, ankaŭ teron kaj havaĵon de heretikoj kaj iliaj aliancanoj. Komenciĝis krucmilito, kies celo estis murdi la katarismuloj. Oni taksas, ke dum tiu krucmilito oni mortigis milionon da homoj, ne nur kataroj, sed ankaŭ pli multan parton de loĝantaro de la suda Francio. Monaĥestro, gvidanta la armeon, kiam oni plendis, ke estas malfacile diferenci kredantojn de heretikoj, respondis: „***Murdu ĉiujn, Dio ilin diferencos***”. La papo Innocento III asertas: „***Kiu strebas krei la propan bildon de Dio, malkongrua kun la eklezia dogmo, devas esti bruligita***”.

**La jaro 1229**
La papo Gregorio IX malpermesis legi biblion, minacante al malobeintoj per sankta inkvizicio.

**La jaro 1231**
La papa ordono rekomendis bruligi heretikojn sur ŝtiparo. El teknika vidpunkto tio permesis eviti disprucîĝon de sango.

**La jaro 1234**
La papo Gregorio IX persvadas krucmiliti kontraŭ kamparanoj en Steding, kiuj rifuzas pagi por la episkopo de Brema troan tributon. Kvin mil da viroj, virinoj kaj infanoj estas murditaj de krucmilitantoj kaj havaĵojn de la kamparanoj transprenas la murditoj, pridonacitaj per tiuj fare de eklezio.

**La jaro1244**
Dum la koncilio en Narbonne oni decidis, por kondamnante heretikoj, oni savu neniun. Nek edzojn pro la kulpo de edzinoj, nek edzinojn pro kulpo de la edzo, nek gepatrojn pro la infanoj. „***La verdikto ne devus esti malaltigita pro malsano aŭ alta aĝo. Ĉiu verdikto devus inkluzivi skurĝadon***”.



**La jaro 1252**
En buleo „**Ad extripanda**” la papo Innocento IV komparis ĉiujn kristanojn ne katolikaj al murdistoj kaj ordonis al la regantoj, por ke tiuj herezuloj estu mortigitaj plej malfrue la kvinan tagon. (Kristanoj estis dividitaj je katolikoj kaj ne katolikoj nur post la elpaŝo de Luter – XI jarcento ?)

**La jaro 1252**
Torturoj estas permesitaj fare de eklezio **(tion establis la papo Innocento IV)**. Permesitaj estis jenaj torturoj: rompado sur rado, pendigado sur manoj, samtempe pezigante piedojn, premado de plej sentemaj korpopartoj, sidigado sur la ardantaj karboj aŭ fero, rompado de artikoj, kuirado vivuloj ktp. La eklezjo certigas, ke tio estas „**Homeca**” esplormetodo. Sur la torturilojn oni metis devizon: „**Gloro estus por Dio**”….

**La jaro 1263**
Oni akceptis alprenon de komunio sub unu formo.

La jaro 1264
Oni establis solenaĵon de Dia Korpo. ( *mi legis ke tiu festo ekzistas de la jaro 1320.*)

**La jaro 1275**
Aperis disputoj pri pago de tributo. Responde al tio la papo ekskomunikis la tutan urbon, Florencon.

... al la paĝo 13

... el la paĝo 11

# VIRTUALA VIVO



**XIV jarcento**
Eksplodas epidemio de pesto. Eklezio klarigas ke kulpas judoj, kaj instigas al peresekutoj kaj agresoj kontraŭ ili. Komenciĝas ekstermojn.

**La jaro 1311**
La papo Klemenso V kiel la unua kronis sin per triobla krono de reganto.

**La jaro 1313**
Koncilio en Zamorze denove ordonas perforton kontraŭ judoj kaj sub minaco de ekskomuniko postulas plenumon de tiuj decidoj fare de la laikaj regantoj. Kontraŭjudaj ekleziaj dekretoj estos eldonataj ĝis la XiX jarcento.

**La jaro 1326**
Malkonkordo de tre riĉa eklezio kun mesaĝitaj de ĝi ideoj de Jesuo Kristo, alkondukis al deklaro de la papa buleo „**Cum Inter nonnulus**", kiu opinias kiel herezon aserto, ke Jesuo kaj liaj disĉiploj posedis neniun materian havaĵon. Probable ili estis tre riĉegaj.

**La jaro 1349**
En 350 germanaj urboj kaj vilaĝoj perdas vivon preskaŭ ĉiuj judoj, plej ofte bruligitaj. Dum unu jaro kristanoj murdis pli da judoj ol iam dum la ducent jaroj de persekutoj, paganoj murdis kristanojn. Tiu estas nur unu el epizodoj de judpogromoj, ĉar similaj okazaĵoj havis lokon dum la tuta tempo, kiam regis eklezio.

La jaro 1377
Roberto El Genevo dungis bandon de volontuloj, kiuj post la akiro de Bolonio ekiris al Cessna. Dum tri tagoj kaj noktoj, komencante de la 3a de februaro 1377, ferminte urbajn pordegojn, tiuj pseŭdosoldatoj buĉis ĝian loĝantaron. En la jaro 1378 Roberto el Genevo ekposteniĝis



kiel papo kaj akceptis nomon Klemenso VII. En la sama jaro Bartolomeo Prignano ekposteniĝis kiel la papo Urban VI kaj eklezio havis du kontraŭbatalantaj sin reciproke papojn.

**La jaro 1378-1417**
Okazas t.n. „**Granda Skismo**". La regado estas dividita inter du papoj – unu oficas en Romo, la alia en Avignion. Kvereletoj ne tuŝas religiajn temojn, sed politikon kaj regadon.

**La jaroj 1450-1750**
Tempo de ĉasado de sorĉistinoj. Centojn da virinoj, akuzitaj pri sorĉoj oni torturis mortige. Oni aplikis jenajn torturojn: rompo per rado, pendigo sur manoj, vipado, rompado de artikoj kaj ostoj per rado, kuirado en oleo, enbatigo pikilojn en okulojn, enverŝado de boligita akvo en orelojn, forŝiro per tenajlo mamojn kaj eksterajn seksorganojn, sidigado sur ardantaj fero aŭ karbo. Infanoj oni ankaŭ povis akuzi pri sorĉoj: knabinoj se ili estis almenaŭ 9,5 jaraĝaj kaj knaboj, kiam ili estis 10 jaraĝaj. Pli junaj infanoj oni torturis por akiri deklaron kulpiganta gepatrojn. En juĝprocesoj oni konsideris deklaron eĉ de dujaruloj!

**La jaro 1466**
La papo Paŭlo II, samseksemulo aŭ transvestulo, nomita de sia antaŭlo, Pius II, „**bona Marinjo**" kaj de kardinaloj „**Nia Sinjorino Kompatinda**" komencis krucmiliton kontraŭ husmovado.

**La jaro 1475**
La papo Sykstus IV, akuzata pri incesto kun la propra fratino kaj partopreno en seks-diboĉaĵoj, por plibonigi financoj de kurio, impostigis prostituinoj.

La jaro 1483
Giovanni Giakomo Scafenati en la 23a vivojaro estiĝas la plej juna kardinalo de la mondo. Li ŝuldas tion al amindumado kun la papo Sykstus IV.



Renkontiĝo de trridek kvin kapoj ( klaĉoj ) **Louis Léopold Boilly**

# VIRA VIVO (1)

## La unua tago hejme

Nova viro hejme tio estas ĝojo por la virino, sed ankaŭ novaj devoj. Oni ne povas forgesi, ke ofte ni ne konas lian genealogian nomaron nek lian antaŭan posedantinon. Por ĉiu okazo oni ne devas plenumi tro abruptajn movigojn. Pli bone ankaŭ ne paroli tro laŭte ĉar li povas kunvolviĝi, kaŝi sin malantaŭ ŝrankon kaj oni devas funkciigi polvosuĉilon por lin devigi forlasi la lokon. Tial jam de la sojlo ni parolas al li per milda sed decida voĉo. Ni kuŝigas lin sur kanapo, kareseme glatas la kapon (singarde, ĉar li povas esti ne kutima) kaj ni permesas al li lasi ĉe si mantelon, por ke li sentu odoron de la antaŭa hejmo. La unua nokto estas kutime plej malfacila, li povas singulti kaj pepi, sed ni devas resti konsekvencaj kaj ne tuj preni lin en sian liton, por ke li ne alkutimiĝu.

## Fikutimoj

Jam post kelktaga restado de la nova viro en nia hejmo ni supraĵe orientiĝas kiajn kutimojn li kunportis. Plej ofte li alfiksiĝas al la loko, en kiu li pasigis la unuan nokton, do al kanapo kaj tie volonte prenas lokon en horizontala pozicio. Ofte kun teleregilo en la mano. Foje-foje kun gazeto. Sporade kun libro. Ĉar li ne multe parolas oni povus supozi, ke li pensas. Plej ofte evidentiĝas ke tio estas nur iluzio. Kiam li komencas senti malsaton, li forlasas la kuŝlokon kaj traserĉas kuirejon. Bone se ni tiutempe troviĝus hejme kaj rapide preparu por li ion por manĝi, alie ni trovos en kuirejo stakon de malpuraj potoj, sub piedoj iujn algluiĝantajn substancojn kaj ĉio alŝutita per sukeroj kaj paneroj. Kaj en fridujo malplenaj postlaktaj kartonskatoletojn. En ĉiu okazo tamen ne batu la viron, ĉar li forkuros.

## Nutrado

Nutrado de la viro kutime ne estas tro komplika kaj eĉ averaĝe kulinare kapabla virino elportos tiun ŝarĝon kaj en iuj kazoj ankaŭ ligitajn kun tio kostojn. Oni ne devas sin stresi pri tio, kion opinias pri nia kulinara arto la viro, ĉar neniu el ni ne scipovas kuri same bone kiel lia panjo. Do ni servas ĉion ajn, por ke nur tio estu warma, ĉar li manĝante ne deŝiros rigardon de televidilo aŭ de gazeto. Laŭdire konataj estas kazoj, ke oni sukcesis instrui viron, ke sandviĉoj li manĝu super la telero kaj ne en la lito, por ke li ne manĝu el kuirpoto, nek manĝu la tutan pecon da kolbaso kiel barbaro, sed tiuj informoj ne estis sciencе konfirmitaj. Unu estas certa – la viro ŝatas ricevi manĝaĵon regule. Pli rapide li malsovaĝiĝas.

## Flegado – vestado

Flegado de la viro postulas multajn klopodojn kaj senĉesan inspektadon. Neniu, kiu ĝis nun ne kultivis la viron hejme, ne scias kian devon oni prenas sur siajn ŝultrojn same en labortagoj kiel en festoj. La unuaranga afero estas kompletigi novan vestaĵon. Se ni tion ne faros la viro ne forlasos la foruzitan t-ĉemizon kaj pufigita per genuo sportpantalonon. Escepte, ke ili ne forfalos de li pro foruziteco. Poste oni nur devas metadi ĉiumatene pretan veston antaŭ lin, lavi, purigi, gladi, alkudradi butonojn, kompletigi kolorojn kaj laŭdi, ke li bonege aspektas. Kaj povas okazi, ke la unusola signo de agnosko de tiu virflegado estas spuro de fremda ŝminko sur lia kolumo.


## Flegado-higieno


Estas viroj, kiuj timas akvon kvazaŭ ĝi estus fajro, sed tiajn oni povus flarsenti de distanco. Aliaj ŝategas bani sin dum horoj. Do, ni devas akcepti (ĉar neniu ankoraŭ elpensis iun metodon kontraŭ tio) ĉiam levitan tabulon en necesejo, malpuran bankuvon, disŝprucitan je kvinmetra radiuso akvon, malfermitan tubon kun dentopasto, akvon en sapujo kaj tretitan sur planko vian personan blankan bantuketon. En ekstremaj kazoj danke al multjaraj penoj, oni povas ellerni la viron mallongigi ungojn ĉe la piedfingroj. Verdire tiuj fortanĉaĵoj troviĝos surplanke, sed viaj suroj post la komune pasigita nokto ne aspektos kiel post la batalo kontraŭ la bengala tigro.

... al la paĝo 17



# SENVORTA VIVO













# VIRA VIVO (2)

## Hejma kultivado de la viro

Flegado-kosmetikaĵoj

Kutime la viroj malvolonte uzadas kosmetikaĵojn, sed razŝaŭmeton kaj senodorigilon prenas de via breto kaj aldone impertinente plendas, ke ĝi odoras tro flore. Ofte ili ankaŭ uzadas nian ŝampuon , dento-paston kaj likvaĵon por gargari buŝon. Tio estas iritiga sed an-koraŭ ne riproĉenda. Maltrank-vili oni devas kiam komencas manki nia brokata pudro, ŝmin-ko kaj precipe kiam ni rimarkos, ke iu portis nian puntan sub-veston …

Sano

Ĉe la viroj eĉ plej leĝera malvarmumo aŭ nazkataro po-vas havi tre danĝerajn sekvojn. Ne por li kompreneble, sed por ni. Suficas iom altigita febro aŭ eta vundo kaj ni havas hejme histeriigan, mortantan viktimon, kiu postulas de ni alte speciali-gitan kuracistan servon kaj psi-koterapion, kaj certgojn, ke tutcerte li ne mortos. Per su-perhoma peno sinregi kaj paci-enco ni devas iel travivi, elteni tiujn eksplodojn de hipoĥondrio kaj senigi iujn ajn iluziojn, ke se ni mortados je pneŭmonio, iu donos al ni glason da akvo. En situacio, ke ni malsanas li ve-nos kaj demandos: „kion ni ho-diaŭ tagmanĝos?"

Movado

Krom la malvasta grupo de amatoroj de aktiva ripozo, la vi-ro, kiel la kato, scipovas agra-ble travivi la vivon ne forlasante fermitajn ejojn. Ne kalkulante mallongan distancon „al" kaj „de" automobilo li faros ĉion por ne permesi sin promenigi, li ti-mas tion kiel diablo benitan ak-von. Li pretas tiam eĉ fari ion utilan hejme kaj pli bone estas lasi lin en paco. La lasta savta-bulo por teni lin kaj nin mem en bonformo estas provoki lin sek-se aktivi. Tio solvos la aferon de jogo aerobiko, arta gimnasti-ko, hiperspiradon kaj aliaj. La hejma metodo – sana kaj mal-multekosta.

Reproduktado

Kronado de la sana kultura-do estas akiro de sanaj posteu-loj. Oni ne povas fari oftan eraron, atendante ke la viro mem reproduktiĝos, nek esperi, ke riĉigo de kultivado per aldo-no de la dua viro solvos tiun problemon. Tio ne solvos ĝin. Ni memoru, ke pri reproduktado ni devas helpi al li kaj ludi ĉe tio la ĉefan rolon. Unusola kion la viro devus memstare multobligi estas rimedoj por eduki la pos-teulojn.

Kontrolo
Kiam ni jam sufiĉe ĝojis pri nia viro kaj li malsovaĝiĝos kaj ko-mencos fide manĝi el nia mano, ni povas delikate permesi al li forlasi hejmon. Unue nur por la-borloko, poste al lia panjo tag-manĝi, kaj eĉ kiel premio pro la bonkonduto, al bierejo kun la kolegoj. Sed ĉiam oni devas esti atentema. Verdire oni ne povas ligi lin al radiatoro kaj ĉie akompani lin, sed por kio estas mobiltelefonoj. Se li havas pu-ran konsciencon kaj amas nin, li mem anoncas sin averaĝe ĉiun horon, almenaŭ per SMS-o. Ĉagreni oni devas komenci, ki-am „abonanto estas portempe ne alirebla". Tiam oni devas mallongigi bridilon, ĉar estus granda malŝparaĵo, se nian fle-gitan, bontenitan favoratulon uzus iu alia virino.

Dresado

Pli facile estas transigi kamelon tra la kudrilan truon ol ellerni ion la viron. Dresado devus ko-menciĝi en la infanaĝo kaj se ĝi estis neglektita en la familia nesto, ni havas neniun ŝancon por tion ŝanĝi. Kaze de manko de elementaj bonkodutaj princi-poj pli bone estas ŝanĝi tiun ek-zempleron je alia. Ne mortdormigi. Ja oni povas redo-ni lin en bonajn manojn de eks-citanta nin de longe kolegino, lasi en montara rifuĝejo aŭ en arbara aŭtoparkejo.

Libera tempo

la viron ni akiras konvinkitaj, ke tiu plenumos nian liberan tem-pon per agrablaĵoj kaj ĉ tio ni tre seniluziiĝas. Ĉar evidentiĝas,

... al la paĝo 18



# VIRA VIVO (3)

## Hejma kultivado de la viro

ke pro posedado de viro ni ne plu havas liberan tempon. Prefere ni devas organizi lian liberan tempon, por ke li ne malviglis tute. Iuj optimistinoj rigardas kun ili sportajn aranĝojn, konstruas aviadiletojn aŭ flegas ĝardeneton de liaj gepatroj. Pesimistinoj eklaboras ĉe la dua posteno kaj fariĝas specialistinoj.

### Obeemo

La viroj neniam aŭskultas tion, kion ni diras al ili. Ili ja havas du orelojn, sed unu el ili servas enlasi niajn vortojn la alia por tuja forigo de ili. Se foje-foje ŝajnas al ni, ke ili aŭskultas atente, sed tio signifas, ke certe li havas abdomendolorojn aŭ urĝe bezonas necesejon. Tial la provoj devigi ilin plenumi tiel simplajn aferojn kiel aĉetado de bazaj produktoj, forigo de rubaĵoj aŭ akvigo de floro dum nia foresto estas tute sensenca kaj kaŭzas ĉe ni mem nur senbezonan iritiĝon.

### Artifikoj

Se ni akiris viron kun denaska inklino al gajeco kaj ludemo ni havas ŝancon ellrni lin kelkajn artifikojn, kiuj iom faciligos nian vivon. Ekzemple – reveno al hejmo post la telefona alvoko, ĝusta uzo de necesejo (dum pisado), scipovon enmeti malpuran subvestaĵon en lavujon, alportado de materiaj havaĵoj kaj uzo kun kompreno la vortojn - „mi petas”, „pardonu” kaj „mi dankas”. Jen tia edukludo. Por efektoj oni devas longe atendi, sed tamen oni povas ekprovi.

### La propra angulo

Tre grave estas, ke la viro havu en loĝejo la propran lokon, en kiu li povas sin kaŝi kaj ne malhelpi al ni. Plej bone se tio estus lia propra ĉambro kun skribotablo plenigita per netuŝeblaj sanktecoj, bruanta televidilo, kuŝejo, kie li povus dormeti, ŝajnigante penan laboron. Ni enmiksiĝas nur kiam komencas en la domo fetori. Plej bone vestitaj per laborvesto, kiun oni vestas por reuzado de radioaktivaj forĵetaĵoj.

### Viro en la lito

Estas neeviteble ke pli aŭ malpli frue la viro deziros eniri nian liton. Li englitiĝos ĉe la muro, forpuŝos nin per manegoj kaj nokte forpuŝos nin planken, pli frue fortiros de ni kovrilon. Se per iu mirakla metodo ni ne permesos ĉion ĉi, li alkroĉiĝos al ni kiel polpo , premos nin per sia tuta pezo kaj ronkos rekte en nia orelon. Verdire estas neniu maniero por tion eviti, sed certa konsolo estas en tio, ke la viro radias multe da varmo, do en la periodo aŭtuna-vintra oni povas ŝpari je varmigado.

### Ludiloj

La viro plej ŝatas ludi je „doktoro”. Bedaŭrinde kiel ĉe ĉio alia li ne scias kiam ĉesi kaj ni ne ĉiam emas akompani lin ĉe tiu ludo, ĉar ja ni havas propran laboron kaj bezonon dormi almenaŭ ses horojn dum diurno. Tial, por ke li ne enuu, aŭ ne serĉu alian akompananton, oni devas permesi al li ludi per liaj plaĉaj ludiloj. Per nova aŭtomobilo, motorciklo, hejma kinejo, monumenta muzikaparataro aŭ per plej nova saĝtelefono kun interreto kaj fontano. Gravas, por ke li estu okupita dum ni ludas kiel riparisto de kranoj, elektrikisto, lignaĵisto, kuiristo, rivelisto ktp. …

### La viro sola hejme

Okazas, ke ni devas forveturi kaj lasi viron hejme sola. En tia kazo ni sekurigas en la hejmo ĉion eblan. Floroj ni deponas ĉe najbarino, papagoj ĉe amikino kaj ŝparaĵoj en banko. Ni lasas plenigitan fridujon kaj ordigitan loĝejon, por ke estu agrable por li.
Revanante ni vidas kosman malordon kaj malplenan fridujon. Ni suspiras kontentige … se estus ordigite tio signifus, ke aŭ li ne dormis hejme aŭ iu helpis al li forviŝi spurojn de la seksperfideco.

db



# FREŜA MAGIA KVADRATO

nur por tiuj, kiuj ŝatas pensi ! aliaj - lasu ĝin


1. virinaro de turka reĝo ...........
2. malprofesiul' ........................
3. fulma, mallanta ..................
4. ceremoniar' .........................
5. vir' pozanta antaŭ pentrist ...
6. elokventa, publika parolant' .

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | |
| 2 | | | | | | |
| 3 | | | | | | |
| 4 | | | | | | |
| 5 | | | | | | |
| 6 | | | | | | |

**Kiumaniere vi solvos krucvortenigmon**


Unue oni devas iomete pripensi !
Por ke solvado estu pli klara - enskribu majuskle literojn!
Per sageto eniru kvadrateton kaj musklaku ĝin
(per maldekstra puŝbutono).
Enskribu ĝustan literon de la vorto kaj iru al sekva kvadrateto. Enskribu sekvan literon kaj iru ... ktp, ktp.
Por kontroli ĝustecon de magia kvadrato - iru al la lasta paĝo... SED...
Unue vi devas iomete pripensi...


**Solvo sur la lasta paĝo**





# SENVORTA VIVO
















# POLITIKA VIVO

Stanisław Michalkiewicz

**Problemo de „rifuĝintoj"** aperis kiel postsekvo de pacaj kaj stabiligaj misioj, militoj por paco kaj demokratio kaj jasmenaj revolucioj. Ili ĉiuj enigis multajn landojn de Proksima kaj Meza Oriento, kaj de la norda Afriko en staton de sanga kaoso.

Tiel iel okazis, ke preskaŭ ĉiuj el tiuj landoj estis en pasinteco konsiderataj kiel minacantaj por Israelo. Ekzemple Jordanio, kiun regas tirano ne estis enigita en tiun sango-kaosan staton. Neniu en tiu lando intencas batali pri demokratio aŭ io simila – ĉar Jordanio en 1994 subskribis kun Israelo pacan traktaton. El la tempa perspektivo oni povas rimarki, ke ĉiuj tiuj pacaj armeaj operacioj estis inicitaj apoge al Israelo, kvankam kompreneble la pretekstoj estis aliaj. Aldona indico, kiu atestus pri tio, estas konvinko de eksa prezidento de Usono Bush-junioro aŭ eble ankaŭ la tuta Bush-dinastio, ke ***la dia reĝeco sur la tero ekestos nur kiam Israelo transprenos politikan regadon en la mondo.***

Politiko nur ŝajne estas racia, ĉar oni ne povas racie pruvi bezonon de la domino, kio estas motoro de politiko – kaj kio do se ni aldonos al tio iujn frenezaĵojn? Alian, sekvan indicon montras ĉirkonstanco, ke pli kaj pli da judoj egaligas ne nur antisemitismon kun observokapablo, ja tiel estis ĉiam, sed ankaŭ opinias ĉiun kritikon rilate al agoj de Israelo kiel antisemitismon.antisemitismon, klare obeemante al la rasisma simpligo, kongrue kun kiu kvazaŭ la judoj estus esceptaj en la tuta Universo kaj pro tio havus rajton trakti aliaj naciojn de supre .

La judaj vivmedioj, profitante al tiu celo diversajn utilajn idiotojn, kiaj en la mondo estas bedaŭrinde pli kaj pli multaj, provas alŝuti tiun paranojajn vidpunktojn al la tuta mondo, kio kompreneble devas naski diversajn streĉojn. Stato de la sanga kaoso en kiun estis enigitaj multaj landoj, estas kaŭzo kaj ŝajnigo de morala motivigo de hommigrado el Proksima kaj Meza Oriento kaj el la norda Afriko al Eŭropo. <u>Inter tiuj migrantoj dominas junaj viroj, malpli ol 30-jaraj, do taŭgaj por batali/militi.</u> Forigo de tiamaj terenoj de unu kaj duono aŭ eble eĉ du milionojn da tiaj viroj malgrandiĝas eblan minacon por Israelo, sed pligrandiĝas por Eŭropo.

Krome, rimarku, ke sendo de nur unu tia migranto al Eŭropo kostas kelkajn milojn da eŭroj kaj kvankam tiuj terenoj estis detruitaj fare de la pacaj militoperacioj kaj nuntempa sanga kaoso, en kiu multaj homoj perdis la tutan sian havaĵon, tamen la migrantoj de ie akiras tiun monon, por pagi al la kontrabandaj mafioj. Verŝajne unu malriĉulo ne pruntas de alia malriĉulo – de kie la malriĉuloj havus tiom da mono? Do iu devis krei por tiu operaco/entrepreno financan inĝinerion kaj krediton, dank' al kiuj migrantoj povos ekvoji. Sed la migrantoj devas ja lasi iun asekuron, ĉar ja ili foriras en nekonaton. Unusola asekuro de ilia flanko estas ostaĝoj el plej proksima familio – kaj tio klarigas kial „**migrantoj**" klopodas atingi landojn, en kiuj la socia subteno estas plej alta, ĉar ja oni devas lasitan familion elaĉeti, kaj tie oni ne ŝercas.

Ni vidas do, ke tio estas precize planita operaco, kies celo povas esti rezultigo de detruiga milito. Iun lumon ĵetas sur tiun aferon orgojla deklaracio, kian en 1989 formis la tiama prezidanto de Eŭropa Komisiono Jacques Delors, agnoskante en la parolado, ke ***celo de la Eŭropa Unio estas deklari ekonomian militon kontraŭ Usono***. Ĉar la juda politika lobio havas grandan influon al politiko de Usono – iuj eĉ diras, ke „vosto turnas hundon" – do nenio mirinda, ke ĉio ĉi ligiĝas, des pli ke pli kaj pli ofte oni aŭdas voĉojn pri bezono translokigi Israelon en iun pli sekuran lokon.

En Eŭropo estadis diverse, sed – kiel rimarkis France, pastro de la Rochefoucauld – nur pro tio Dio ne sendis sur la teron la duan inundon, ĉar konvinkiĝis pri senutileco de la unua, do nenio mirinda, ke la judoj ankaŭ provas – precipe je perspektiva ebleco de akiro fare de iuj muzulmanaj landoj la atomarmilo – ĉirkaŭrigardi en la mondo por serĉi iun alternativan sidejon.


Multe montras, ke la argusa okulo haltis sur fekundajn kampojn de Ukrainio, kiun jam regas la ĉefministro Volodymyr Hrojsman, kiu – kontraŭe ol la ĉefministro Arseniko Jaceniuk, apenaŭ „**suspektata**" pri la juda deveno – pri nenio suspektata ne devas esti, kaj sur Pollandon, kie en la medio de la juda gazeto por la poloj multiĝas hagadoj pri postmilita martireco, kiel en la tempo de Stalin rakontoj de la okulatestantoj pri koloradiaj skaraboj alŝutataj sur la kreskaĵojn de terpomoj de la ŝtataj bienoj fare de la usonaj aviadiloj.


**db**

# KARIKATURA VIVO















# NOVELA VIVO

**BUKAJ-AJ ESPERANTISTAJ FRENEZETULOJ**

de Barry Friedman

**Estas barataj vendejo-posedantoj** de la Guĝarato kaj aŭtovendistoj kiuj estas tri generacioj for de kamparanoj en Limo, Ohio aŭ Indiano aŭ Okcidenta Virginio. La kvartalo estis kruda, la trafiko atendis neniam ĝis tiam, kiam la semaforoj ruĝiĝis, kaj la piediranto-vojetoj estis neefikaj. La homoj atendantaj por la buso estis ĉiam koleraj kaj ĉagrenitaj kvazaŭ iliaj vivoj estas perditaj en nenieco. Rudiakaniso vivis kvin blokojn for de tiu kvartalo en malsupromez-klasa, modesta areo de unu-etaĝaj domoj kiuj indikas uson-stilon de pli frua epoko.  Estis grandaj leterkestoj dekstren ĉe la faco de la trotuarrando kaj la domoj estas pentritaj blankaj kaj bluaj kaj verdaj kun krestetoj. Heĝoj de arbustoj ĉirkaŭas la malgrandajn logxejojn, kio donis al ili realan usonan banalecon kaj normalecon. Vjetnamio-militaj veteranoj estis la najbaroj de Rudiakaniso. Ili estis viroj kiuj spertis tiom traŭmaton pro la rigardado je la pereado de siaj kamaradosoldatoj en la Vjetnama ĝangalo pro atakoj de Napalmo ke ili ne plue povis labori kaj do vivis per malkapablec-transpagoj el la federala registaro. Flor-infanaj judaj virinoj el Kolorado kaj Kentukio ankaŭ vivis ĉirkaŭ la areo kaj Rudiakaniso estis afabla al cxiuj.


**Li estis mallonga, ronda, kalva,** kaj feliĉokulita vireto kiu havis fremdan akcenton. Lia patro estis germano de francohugonota deveno kaj lia patrino estis rusa aristokrato de Sankta Petersburgo antaŭ ol la revolucio de 1917 kaj Lenin kaj liaj bolŝevismaj amikoj sturmis la Vintran Palacon kaj ruinigis ĉiun amuzon por ĉiuj. La gepatroj de Rudiakaniso renkontis unu la alian en Latvio dum la 1930aj jaroj tiam, kiam Sovetunio regis. Rudiakaniso naskiĝis en Rigo, tiu granda ĉefurbo ĉe la latva marbordo. Li kreskis parolante la latvan, la germanan, kaj la rusan. La familio transloĝiĝis el Rigo al la Nigrarbaro en Germanio kiam Rudiakaniso havis naŭ jarojn. Rudiakaniso kaj lia familio estis feliĉaj homoj en Germanio ĝis la dua mondmilito ekeksplodis kaj Rudiakaniso trovis sin en dramo kaj tragedio. Li estis Hitlerojunulano. Li estis trejnata malami la judojn, malami la francojn, malami la anglojn, kaj malami la polojn. Post la milito Rudiakaniso kaj liaj gepatroj fuĝis el Eŭropo pro la timo, ke baldaŭ tria mondmilito denove eksplodos. Ili vojaĝis ŝipe el Anglio al Bostono. En Bostono ili vojaĝis trajne al Oregono. Rudiakaniso, havante nun nur dek naŭ jarojn, estis tre ekscitata pro tio. Al li la vojaĝo  estis granda aventuro. Por liaj patrino kaj patro, tamen, tio estis teruranta ŝanĝo. Antaŭe iliaj tutaj vivoj pasigis en eleganta Eŭropo. Nun ili estis irantaj vivi en Oregono inter arbaristoj kaj kamparuloj!

**Surprize en Oregono Rudiakaniso floris**. Li diplomiĝis el mezlernejo kaj kolegio kaj poste ricevis postdiploman titolon tie. Tiam la tuta familio transloĝiĝis al Kolumbuso kie Rudiakaniso trovis laboron. Sed al siaj gepatroj, tamen, loĝi en Kolumbuso, Ohio, estis loĝi sur Plutono dum loĝi en Oregono estis nure loĝi sur Jupitero! Estis ŝoke por kleraj geeŭropanoj veni al tia bovinourbo de terkulturistoj kaj malkleraj sportidiotoj. Ekde tiu tempo Rudiakaniso pasigis siajn tutan vivon en Kolumbuso en tiu sama domo. Li neniam geedziĝis kaj neniam eskapis la feran manon de siaj gepatroj ĝis tiam, kiam ili forpasis kaj li fariĝis maljunulo.

al la sekva numero




# S T A T I S T I K A   V I V O




**Sur ĉi-tiu ruĝa parto de la mapo**
**vivas tiom da homoj kiel sur la blua**




**Mongolio estas la plej granda lando,**
**kiu ne havas aliron al la maro.**




**Uzitaj temperatur-gradoj**
**dum mezurita temperaturo en la mondo**




**La blua koloro indikas landojn,**
**kie ne ekzistas restoracioj de McDonalds**




**KARIKATUROJ**

1. Prezidentino Dilma
2. Princo Karolo
3. Omar Sharif
4. Cantinflas
5. Sarah Palin
6. Albert Einstein
7. JFK

La paĝo nro 4 - **Hugh Hefner**

**MAGIA KVADRATO**

1. HAREMO
2. AMATOR
3. RAPIDA
4. ETIKET
5. MODELO
6. ORATOR